



**4(140)  
2013**

# Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

**Bultenon redaktas:** ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,  
**Adreso por korespondi:** str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Lidia Ligeza

## birdoj

en mia ĝardeno  
eĉ vintre  
ĉirpas kveras kaj fajfas  
birdoj

okupitaj pri siaj gravaj  
birdaj aferoj  
ili rimarkas min nur tiam  
kiam mi ŝutas manĝon

mi ŝatas rigardi  
kiam ili furaĝas sin en nutrigejo  
observante kutimojn de la specio  
paseroj – surloke  
paruoj – kaptante greneron  
kaj forflugante sur la najbarajn arbojn  
merloj – ĵus dum grandaj frostoj

ili faras kion faras  
ĉiam certaj la plej bonan rezulton  
ne hezitas post la decido  
ne intertraktas kun malamiko  
simple batas ĝin en bekon  
ne ŝanĝas principojn

kiel mi al ili ĵaluzas

\*\*\*

iam vi foriros  
tia estas fino  
de preskaŭ ĉiu  
pli proksima rilato

oni devas esti preta  
por tia  
probable neevitebla  
finalo

ĝi estos doloriga  
sed malgraŭ ĉio  
oni povas imagi  
ke mi estus pli kontenta  
pensante pri via ekzisto  
ie en diversaj lokoj

kaj ke ne eblas viziti vin  
sub certa unusola  
aktuala dum tuta diurno  
adreso  
ĉe ĉiam la sama aleo  
sub ĉiam la sama arbo

